

Leterujo, 5-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 530, 1973.12.05 & 08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Alvenis la momento konkludi nian babiladon kun niaj skribemaj geaŭdantoj. Kiel ni jam menciis je la malfermo de nia leterujo, ĉifoje ni ricevis leterojn kaj poŝtkartojn el 20 landoj. Ni jam perradie respondis al niaj aŭskultantoj en Aŭstralio, Aŭstrio, Brazilo, Britio, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Germanioj okcidenta kaj orienta kaj Hungario. Hodiaŭ ni salutas niajn geaŭdantoj en Italio, Jugoslavio, Kanado, Kubo, Nederlando, Norvegio, Nov-Zelando, Pollando, Svedio, Svislando kaj Usono.

A.- En Italio ni salutas la esperanto-klubon en Prato, sinjoron Giuseppe Casagrande en Bologna, kiu ne nur regule aŭskultas niajn posttagmezajn elsendojn sed, kiam li trovas ilin interesaj, li surbendigas ilin dum la vespera ripeto, por posta reaŭdigo en la loka esperantista klubo. En multaj lokoj aŭskultantoj faras la samon. Tio multigas la nombron de nia aŭdantaro.

Cl.- Antaŭ ol forlasi Italion ni ne volas forgesi saluti nian radio-kolegon doktoro Antonio De Salvio, kiu okupiĝas pri la Esperanto-Fako de Radio-Roma.

A.- En Jugoslavio ni salutas doktoron Ivo Oreb en Vela Luka, kiu senkulpiĝis, ĉar li ne ofte donas vivsignon.

Cl.- En Kanado ni salutas sinjoron Serge Cormiek en Dollard des Ormeaux. Kaj por resti en Ameriko, en Kubo, ni esperas, ke sinjoroj Ignacia Juzman kaj Juan Moas Madrigal, ambaŭ en Havano, hodiaŭ facile aŭdas nin.

A.- En Nederlando mortis sinjorino Hendrika Zwaanswijk-Dik en Alkmaar, tre fidela aŭskultantino. En tiu lando ni salutas sinjoron Gerard van der Horst en Den Haag kaj la redakcion de *Komuna Esperanto-Gazeto* en Amsterdam. Tiu revuo fariĝis unu el la plej variaj kaj interesaj esperanto-organoj. Ĝi estas unu el la pozitivaj fruktoj de la federigo de la nederlandaj esperanto-organizaĵoj. Povu la aliaj landoj sekvi la ekzemplon de Nederlando. Tro ofte la manko de rilatoj inter niaj lokaj kaj fakaj organizaĵoj estas kaŭzo de malforto.

Cl.- En la urbo Oslo, Norvegio, ni havas multajn geaŭdantojn. Ni salutas ilin: sinjorino Harda Danielsen, sinjoro Smadall, gesinjoroj Rolf kaj Elze Bugge-Paulsen, sinjoro Arne Aasland, sinjoro Signe Korsbvedt, kiu raportis pri la esperanto-klubo en Oslo, kiu havas 150 membrojn kaj kunvenas 2-foje en la monato. Ĉiam en tiu urbo ni salutas sinjorinon Niss kaj sinjoron Otto Prytz, kiu skribis : « *Tiuj, kiuj dum jaroj sekvadis la prelegojn de doktoro Baur, certe posedas tre ampleksan scion pri Svislando.* » Sinjoro Otto Prytz ankaŭ skribis pri niaj historiaj preleg-serioj : « *La geprelegantoj ĉiam scias riĉigi ilin kun la nuntempo. Ĝuste tio estas bona maniero fari progreson. Gesinjoroj Gacond ofte montras kritikan sintenon al nia movado, sed la kritikon ĉiam akompanas proponoj pri pli bonaj solvoj.* »

A.- Ni nun direktas niajn voĉojn al nia antipoda lando Nov-Zelando, kie sinjoro Vere J. Williams en Palmerston North havas la ĝojon povi nin aŭdi, dank' al fosto-anteno. Tiel niaj elsendoj estas kapteblaj eĉ en Nov-Zelando, kvankam ili estas elsendataj ĉefe por Eŭropo kaj Afriko.

Cl.- En Pollando ni salutas sinjoron Jozef Bieliński en Bydgosza, sinjoron Leszek Kordylewski en Krakow, kiu konservas niajn sendaĵojn, kiel atestojn pri la esperanto-vivo en aliaj landoj. Kaj ni ankoraŭ salutas sinjoron Uspiński Jerzy, radio-kolego, kiu okupiĝas pri la Esperanto-Fako de Pola Radio. Sinjoro Uspiński skribis : «*M aŭdis vin bonege en aŭto, dum vojaĝo ĉe nia meza marbordo, kie mi ĉasis salmojn.*»

A.- En Svedio ni havas plurajn fidelajn aŭskultantojn. Ni hodiaŭ salutas sinjoron Lennard Aberg en Gotenburgo, kiu estis kontenta aŭdi nin raporti pri la progresoj de la mondfederalismo. Li mem estas membro de la mondfederalisma movado. Pri niaj mallongaj elsendoj li skribis : «*Kvankam la programoj estas iom tro « kurtaj » ili estas tre estimindaj kaj laŭdindaj. En 7-8 minutoj vi, kiel estas pruvite, povas diri tre multe da esencaj aferoj.* » Ĉiam en Svedio ni salutas sinjoron C. Aldsten en Karlsterona, kiu alportis al ni la salutojn de la Esperanto-Grupo en tiu urbo. Sinjoro Erik Lundvall en Borlange skribis : «*La gepatran lingvon oni aŭdas ĉiutage, sed Esperanton malofte. Tial estas grava afero, ke la Esperanto-parolantoj en radio parolas klare kaj trankvile. [...] Pri tio ne ĉiuj radio-stacioj pensas.* » Ni dankas pro tiu pozitiva rimarko. En la urbo Huskvarna ni salutas sinjoron Harald Fingalsson, kaj en Kumla sinjoron Fritz Strom kaj fine en Malmö sinjoron Erik Swärd, kiu konstatas, ke nia lingvo multe progresas. Li tute pravas.

Cl.- En Svislando la kurtondoj estas malfacile aŭdeblaj, ĉar la aŭskultantoj troviĝas tro proksime de la elsendejo. Ni tamen havas kelkajn aŭskultantojn. Ni salutas gesinjorojn Pierre kaj Germaine Dorthe en Lausanne, sinjorinon Clara Favre en Nyon, sinjorinon Frieda Hiltpold en Corseaux apud Vevey, sinjoron Daniel Mühlemann en Brugg kaj sinjoron Otto Walder en Romanshorn.

A.- Kaj ni konkludas nian salutadon direktante niajn voĉojn al Usono, kie sinjoro Cornelius J. McKown en Waupelani Drive raportis pri la aŭskultado de unu el niaj prelegoj pri la naskiĝo de la esperanto-movado en Svislando.

Cl.- Tiu elsendo el Svislando montris al vi, ke niajn ondojn oni povas kapti en plej diversaj partoj de la mondo. Ni treege dankas ĉiujn skribemajn aŭskultantojn. Nur pere de iliaj leteroj kaj poŝtkartoj ni povas scii pri ilia ekzisto kaj pri la aŭdebleco de niaj radio-prelegoj. Nun nia leterujo estas malplena. Helpu al ni, ĝin rapide replenigante. Kiam ree troviĝos vivsignoj el dudeko da landoj, ni rekomencos babiladon kun niaj geaŭdantoj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!